S U L F R A N C A   S T E L O

Bulteno de la Esperanto-Federacio "Languedoc - Roussillon"

5, quai Vauban, PERPIGNAN (P.O.). Telefono 34-58-84

N-ro. 1 ---- Januaro 1961

## AL NIAJ AMIKOJ

Jen ligilo inter ĉiuj membroj de la Esperanto-Federacio "Languedoc - Roussillon". Ĉi tiu bulteno aperos laŭbezone, sed komence ni antaŭvidas ĝian trimonatan eldonon, eĉ pli ofte, se eble. Ties celo estas anonci la renkontojn kaj aranĝojn planitajn, por ke laŭeble ĉiuj povos ilin partopreni. Tiucele ni ricevos plezure viajn artikoletojn, sed ni petas bonvolu sendi ilin kiel eble plej antaŭtempe. Ni antaŭdankas vin por via apogo.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

### NOVA ESTRARO DE LA GRUPO DE ARMISSAN (Aude)

Ni ricevis kun plezuro ĝojigajn novaĵojn de nia kara amiko Jules Escaré, dekano de nia Federacio.

La Esperanto-Grupo de Armissan elektis sian novan Estraron, kiu konsistas el la jenaj membroj:

| | |
|---|---|
| Honora Prezidanto | S-ro. Dézarnaud André, urbestro |
| Prezidanto | S-ro. Escaré Jules |
| Vicprezidanto | S-ro. Caussidery René |
| Sekretario | S-ro. Gazel Claude |
| Helpa Sekretariino | S-ino. Bayssas Laure |
| Kasisto | S-ro. Dezarnaud Claude |
| Kasistino | F-ino. Pueyo Danielle |

Ni tutkore deziras plej sukcesan agadon por la disvastigo de nia kara lingvo al ĉiuj novaj estraranoj.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

### UNUA ESPERANTISTA PEDAGOGIA SEMAJNO EN PERPIGNAN SUB LA AŬSPICIO DE LA EDUKA MINISTERIO

Pere de subvencio de 1.000 N.F. ricevita de la Ministerio pri Edukado, la Esperantista Kultura Centro de Perpignan organizis de la 8a ĝis la 15a Decembro pasinta la unuan Esperantistan Pedagogian Semajnon.

Oni registris 210 ĉeestantojn. Gvidis la laborojn kaj faris prelegojn S-ro. André Ribot (Marmande), S-ro. Leo Lentaigne (Montpellier), S-ro. René Llech-Walter (Perpignan), S-ro. Robert Gendre (Ille-sur-Têt), F-ino. Anna Vidal (Perpignan) kaj S-ro. Dario Rodriguez (Madrid).

La ekspozicio kaj sonbendoj pruntedonitaj de S-ro. Lentaigne multe efikis kaj bone impresis la multnombrajn vizitintojn.

Por la nuna jaro 1961 oni antaŭvidas novan Esperantistan Pedagogian Semajnon, okazontan dum la monato Junio. Sed ni parolos pri tio en nia venonta bulteno.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

### GRAVA ARTIKOLO PRI ESPERANTO EN LA REVUO "LA PRESSE MEDICALE"

"La Presse Médicale", semajna medicina revuo, tutmonde konata, publikigis en sia numero 56 de la 17a Decembro 1960 franclingvan artikolon de nia eminenta samideano D-ro. Andreo Albault, de Toulouse. Ĝi ampleksas pli ol tri paĝojn kaj celas informi kuracistojn kaj ĝenerale sciencistojn enlandajn kaj eksterlandajn pri la graveco kaj prestiĝo de nia lingvo kaj de nia movado. La aŭtoro presigis la artikolon ankaŭ sur aparta broŝuro.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## PRELEGO PRI POLLANDO

Dum la pasinta monato Novembro S-ro. René Llech-Walter prelegis pri Pollando, pri la Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Varsovio kaj pri la vizito al Bialistok, la naskiĝurbo de la kreinto de Esperanto D-ro. Zamenhof. La interesplena prelego, kun disaŭdigo de muzikaĵoj de la genia pola muzikisto Chopin kaj projekcio de koloraj lumbildoj okazis ĉe la metia lernejo Jean Alio en Perpignan. Ĉeestis la Direktorino de la lernejo, la profesorinoj kaj multaj lernantinoj.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## D-RO. JOHANO HAMVAI PRELEGOS PRI NOVZELANDO EN PERPIGNAN

Inter la tagoj 25 ĝis 27 Februaro la Kultura Esperantista Centro de Perpignan ricevos la viziton de la eminenta esperantisto D-ro. Johano Hamvai, nun loĝanta en Novzelando, kiu en ĉi tiuj momentoj faras prelegvojaĝon tra diversaj eŭropaj landoj.

La interesplenaj prelegoj de D-ro. Hamvai estos kompletigataj per la disaŭdigo de novzelanda folklora muziko kaj per la projekcio de koloraj lumbildoj.

Ni ne povas anonci la ĝustan daton, horon kaj lokon de la prelegoj, sed ni petas ĉiujn, kiu deziras ĉeesti, bonvolu legi la anoncojn kiuj aperos en la ĵurnaloj de nia regiono ĉirkaŭ la fino de Februaro.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## NE FORGESU LA PAGON DE VIA KOTIZO !

En la komenco de la novjaro 1961 ni invitas ĉiujn esperantistojn pripensi sian moralan devon apogi niajn organizojn sur la internacia, nacia, regiona kaj loka medioj. La meritplenaj klopodoj de Universala Esperanto-Asocio por enkonduki kaj disvastigi nian lingvon en ĉiujn mediojn, sekvataj, kompreneble, de la naciaj kaj lokaj asocioj, okazigas ĉiam pli kreskantan elspezadon.

Ni devas, do, kontribui per niaj kotizoj por ebligi la gravajn taskojn kiujn entreprenis niaj organizoj por la disvastigo de Esperanto.

Jen tabelo de la ĉefaj kotizoj:

| | |
|---|---|
| APROBANTA MEMBRO ........................................ | 1,50 N.F. |
| AKTIVA MEMBRO ........................................ | 3,50 " |
| AKTIVA MEMBRO (kun abono al "Revue Française d'Esperanto") . | 10 " |
| JUNULA MEMBRO (malpli ol 21-jara kaj studentoj) ........... | 6 " |

(junuloj indiku naskiĝdaton kaj studentoj la Fakultaton)

<u>SUPLEMENTOJ POR ESTI MEMBRO DE U.E.A.</u>

| | |
|---|---|
| MEMBRO KUN JARLIBRO (ricevas la Jarlibron de U.E.A.) ...... | 10 N.F. |
| MEMBRO ABONANTO (ricevas la Jarlibron kaj revuon Esperanto). | 20 " |

Sendu la kotizojn al: Fédération d'Esperanto "Languedoc-Roussillon", 5, quai Vauban, PERPIGNAN (P.O.), C.C.P. 956-28 Montpellier.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## STAĜO DE U.E.F. EN GRESILLON DUM LA VENONTA MONATO AŬGUSTO

La staĝo de U.E.F. en la Kastelo de Grésillon okazos fine de Aŭgusto. Ni esperas ke multaj gesamideanoj partoprenos ĝin. Bonvolu peti informojn al la adreso jena: CHATEAU DE GRESILLON, BAUGE (M.-et-L.)

## 53a NACIA KONGRESO DE ESPERANTO EN EPERNAY, JE PENTEKOSTO

La 53a Nacia Kongreso de Esperanto okazos ĉi jare en la bela nordfranca urbo Epernay, dum la tagoj 20, 21 kaj 22 de Majo. Informoj pri la Kongreso daŭre aperos en Franca Esperantisto kaj en nia venonta bulteno.

\- - - - - - - - - - - -

Por ricevi la bultenon sendu al nia adreso 4 poŝtmarkojn de 0,25 NF POR KOVRI LA KOSTOJN DE LA SENDAĴO.